

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 18 Eberswalde 1988-03-20

---

1. Raporto pri nia kunveno dum IFER' 88
  - 1.1. Kiel unu de la pioniroj de la fakgrupo ni povis persone distingi s-ron Pachter per medalo de la "Instituto pri Forstsciencoj" Eberswalde. La aliaj multjaraj geaktivuloj, s-ino Kovalëva, s-ro Barasevich, s-ro Berger, s-ro Moudry kaj s-ro Váňa ricevos la distingon poste.
  - 1.2. Ni aŭskultis intervjuon surbendigitan de la svisa radio MUNOT kun s-ro Pachter pri nia kvinjara forstfaka laboro.:
  - 1.3. La artikolo "Pri acidiĝo en Skandinavio" de Ullrich kaj Pachter ( vidu en la "Bibliografio" nr. 100) nun estas represita laŭ permeso de la aŭtoroj- en la Esp.-revuo "Tra Universitata Mondo", eldonita de la universitato "Danguk" (urso) en Söul.
  - 1.4. Ni informis pri la progreso en nia terminografia/vortara laboro. Ni dissendis la slipojn ĝis nr. 0850 kaj ĝis nr. 0399.1 al la kunlaborantoj. Ni diskutis problemojn rilate evoluon de novaj iloj kaj teknologioj, kiuj postulas ŝanĝojn de definoj (ekz. 0342 senbranĉigi) kaj petas la kunlaborantojn ankaŭ legi kritike la difinproponojn.
  
2. Propono pri sekvonta kunveno de IFRE-anoj. La sciencteknika sekcio de Slovaka Esperanto-Asocio invitas al la konferenco AEST pri "Raciigo en scienco kaj tekniko" (3.- 5.8.88 en Poprad). La temoj estos:
  1. Komputiloj- iloj de raciigo
  2. Raciigo de sciencteknikaj laboroj
  3. Prognozistiko
  4. Terminologio

La limdata por aliĝo de partoprenantoj estos 15.06.88, adresita al Inĝ. Juraj Britka, Vetká okružna 28, CS-010 01 Žilina. Ni intencas partopreni per prelego pri la raciigo de nia vortara laboro.
  
3. Propono pri saluto de forstistoj-esperantistoj
 

S-ro Karol Pacholczyk skribis: "En Pollando la arbaristoj havas propran saluton: "Darz Bór" (legu: daĵ bur), kio signifas laŭvorte "donu arbaro". Ĉu en via lando la arbaristoj ankaŭ havas propran saluton? Mi proponas, ke en la "Forstista Informilo" oni publikigu la salutojn de arbaristoj el ĉiuj landoj. Se tio estus ebla, ĉiuj kunlaborantoj devus sendi al unu persono, kiu kolektus ĉiujn salutojn. Oni povus publikigi la salutojn poparte. Mi ankaŭ proponas la saluton por arbaristoj-esperantistoj, ĝi estas: 'Estu Arbaro!' Al mi ŝajnas, ke tio saluto estas sufiĉe mallonga kaj ni ja bone scias, ke hodiaŭ minacas granda danĝero ne nur al la arbaro, sed ankaŭ al la tuta naturo, Anstataŭ 'Estu Arbaro!' oni ankaŭ povas agnoski alian saluton, ekzemple 'Vivu Arbaro!' Gi ankaŭ estas mallonga kaj havas la saman sencon. Oni povas elekti unu el tiuj du salutoj aŭ akcepti ambaŭ salutojn. Se iu proponus pli bonan kaj pli taŭgan saluton, tiam ni tiun akceptu. Ekde nun ni atendos la proponojn kaj la naciajn salutojn de la IFRE-anoj".

4. Propono pri insigno de forstistoj-esperantistoj  
S-ro Karol Pacholczyk skribis plue:  
"Mi ankaŭ pensas pri insigno por arbaristoj-esperantistoj. Mi povus fari tian, sed bedaŭrinde mi ne havas la animon de artisto kaj ĝis nun ne elpensis mi tian insignon, kiu min kontentigus".  
Ni dankas ankaŭ pro tiu propono kaj la diskuto estas malfermita.
5. Al nia terminografia/vortara laboro.  
La malgranda komisiono, konstante klopodas plibonigi la difinojn kaj kompletigas difinojn. Tial ĉiu kunlaboranto ĉiam denove kontrolo, ĉu la etnolingva(j) ekvivalento(j) konvenas al la difino sur la slipo, aŭ estas > aŭ < ol la difinita nocio. Kelkaj kunlaborantoj komprenis sub nr. 0431 (izolita pozicio) arbon anstataŭ stato de pozicio de arbo. En aliaj slipoj ankaŭ ekzistas intermiksoj de eco kaj adjektivo por eco.
6. Mi petas pardoni pro preterlaso.  
En FI 17 mi forgesis anonci kiel partoprenanton en nia Varsovia kunveno kaj nova kunlaborantino s-ro Maria Bulka, ul. Górns 2, woj Walbzych, Strnis SL, PL-57- 550
7. Aldonajo  
Ullrich, I. : El turingiaj forstkronikoj (4 p.)  
Bibliografio paĝo 5

K. –H. Simon

### **Bibliografio de arbarmastrumada literaturo** (daŭrigo)

81. Bruening, E. F.: Terminologie für Forschung und Lehre in den Fachgebieten und Vorlesungen. Mitt. d. Bundesforschungsanst. f. Forst- und Holzwirtschaft. Hamburg Nr. 152, 1986, 213 p. / BE/ IFE
82. Lammors ,F.: Het groene woordenboek. Vitgeverij Het Spectrum Utrecht/Antwerpen 192 p. 1984 / LA kn
83. Langenhoff, V.; Reijnders, L.: Kessings woordenboek voor natuuren milieu, Keesings Boeken b. v. Amsterdam, Antwerpen BO p. 1981/ LV/ kn
84. Metro, A.: Dictionnaire foretier multilingue, Conseil international de la langue Francaise, 434 p. 1975 / MO / kn
85. Miegroet, M. van: Van bomen en bossen. E. Storv-Scientis. RV.B.A., Gent 2delon, 1166 p. 1976 /MI / kn
86. Plaisence, G.: Dictionnaire des forets. La Maison Rustique. Paris, 217 p. 1969 / PG / kn
87. Vries, P. G.de: Bosbouw zakwoordenboek. Pequeno vokabulario forestall. Pocketvokabulary of forestry, Forestry Department. State Agricultural University Wageningen, Netherlands (Sec. ed. ), 222 p. 1974 / VR / kn
88. Český a slovenský terminologický slovník. Lesnictví – výběr základnick terminu, s ruskými, německými, a anglickými ekvivalenti. Praha 1986, 237 p. // CL. /si

89. Knapp, A.: Vortoj ne troveblaj en Krause kaj v. Waldowski. der esperantist 22(6 / 1986) 133-136 / KN / si
90. Fachwörterbuch für Forst- und Holzwirtschaft (Deutsch-Englisch). ed. Bayerische Landesforstverwaltung München 1946. F.G.Mayer Verlag, Münschen-Solln FA / ul
91. Francuzsko-ruskiĵ lesotehniĉeskij slovar`. Sost.: I.A. Baŝkirov: A.P. Rubinŝtejn, p. red. V.S. Ĉenkova 2- e izd. II: TP „Rus ŝz“ 1986 / BR /
92. Markov A.s.e.a.: Dictionary of scientific and technical terminology (en,de,fr,nl,ru). Ruski Yazyk Publishers – Moscow Ussr Kluwer Technische Boeken S.V. – Deventer, The Netherlands 496 p., 1984 / MV / kn
93. Moirant, R.: Dictionaire du bois. Editions Malgrátout, Bruxelles 256 p. 1986 / HT / kn
94. Middelkoop A. 3.: Nederlands- Esperanto- Nederlands. Vitgevery HotSpectrum N.V., Utrecht-Antwerpen 1986 / MP / kn
95. Waldbau-Glossar (de / fr / it / en). Fachber. Waldbau ETHZ, bearb. v. Ch.Diez. 2. Verb. Aufl. Nov. 1986 / WG / IFE
96. Meksikia Manifesto (esp. B, Marinov 1986 ). Forstista informilo 15 / 1987 / NK / mar
97. Weiger, H.: Helpe de sterkado oni ne povas savi la arbaron (esp. I. Ullrich). Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj 1987,2,23-24 / Wh / ul
98. Schütt, P.: Malsano kun demandosigno (esp. I. Ullrich). TumondajSciencoj kaj Teknikoj 1987, 4, 16-18 / SC / ul
99. I. R. Espero por arbaro. Monato 1986, T, 16-17 / IR / ul
100. Ullrich, I.; Pachter, J.: Pri acidiĝo en Scandinavio. Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj 1986,3, 11-13 / UP / ul
101. Ullrich, I.: La arbaro fonduso en la Germana Demokratia Respubliko. 1986 6p. skribmaŝine / UL / ul
102. Ullrich, I.: El turingiaj fostkronikoj. Forstista Infromilo 18 / 19988. 4p. / UH / ul

### Alonaĵo al IF nr. 18

#### **EL TURINGIAJ FORSTKRONIKOJ**

Ingward Ullrich

Kronikoj, priskriboj de arbaroj kaj aktoj el Turingio prezentas impresan bildon pri la arbara stato de la Arbaro Turingia en la pasintaj jarcentoj. La unuaj arbarpriskriboj devenas el la 16-a jarcento. Ili eldiras, ke multaj montosuproj estis kalvaj, senarbaraj. Ventegoj, arbarincendioj kaj troa paŝtado de bruto en la arbaroj malhelpis sur tiuj montosuproj naturan renovigadon kaj estigis tiele artefaritan laŭaltitudan arbarlimon ĝis la mezo de la 18-a jarcento.

Artefarita forstizo jam ne ekzistis. La “Frankoniaj”, “Heneberglandaj” kaj “Heslandaj” arbarpretigadoj<sup>1</sup> el la 16-a kaj 17-a jarcentoj multpaĝe raportas pri arbardistriktoj “fuŝe hakflegitaj” kaj “forkarbigitaj”. Oni priskribas restaĵojn de seninfluitaj montaj

<sup>1</sup> historia nocio, germane „Waldbereitungen“, konformas hodiaŭ proksimume al la senco de „forstaranĝadoj“

miksarbaroj kaj pledas pri tio, ke en nealireblaj valoj sur montodeklivoj la ligno forputris. Senarbejoj, ofte kaŭzitaj fare de arbarincendioj, nature rearbarumiĝis. En la jaro 1524 la urboj Erfurt, Arnstadt (Arnŝtad), Gotha (Gota) kaj Eisenach (Ajzenaĥ) faris pledon ĉe sia princo pri tio, ke en la lando "Doringen" (Turingio) "estas senarbitaj kaj forkarbitaj ne malmultaj arbaroj je la malutilo de la lando kaj ties homoj". Iom pli poste, en 1548 oni raportas, "ke la arbaroj pro la reganta ĝenerala neniigado fare de senarbitigo, lignokarbitigo, incendioj kaj ventegoj... post malmultaj jaroj ne plu sufiĉos". Kaj 200 jaroj poste, en 1737, iu arbaristo, farinta inspektadon en la arbaroj de Gotha, sciigis la jenan: "En ne malmultaj montolokoj oni trovas tiom da rompita kaj parte duone forputritaj piceoj kaj abioj, kuŝantaj unuj sur la aliaj, ke oni preskaŭ ne povas trairi sen rompi al si brakojn kaj kruojn".

Preskaŭ en ĉiuj partoj de la Arbaro Turingia ekzistis similaj cirkonstancoj. 1810 oni skribas pri la regiono ĉirkaŭ la montovilaĝo Cursdorf (Kurzdorf): "la dehakadmatraj arbaroj estas maldensegaj kaŭze de arbodisrompiĝoj far ventegoj kaj kaŭze de bostrikoj".

Ekstrema klimataj cirkonstancoj, kiel ekzemple longaj sekaj someroj, sed ankaŭ malzorgemo subtenis la estiĝon de vastaj arbarincendioj. Ampleksa arbarincendio frapis la arbarojn en la ĉirkaŭejo de Ilmenaŭ en 1443. Preskaŭ ĉiuj raportoj priskribas la arbarincendion el la jaro 1540, pri kiu legeblas: "...brulis la Arbaro Turingia en la plena daŭro de kvar semajnoj kaj neniu kapablis estingi". 1571 giganta fajro estingiĝis en la arbaroj ĉe Oberschönau (Oberŝenaŭ), kiu furiozis kelkajn tagojn ĝis oni sukcesis estingi ĝin. En aprilo 1576 ĉe Ilmenaŭ forbrulis 3000 akreoj da arbaro (ĉ. 1600 - 1700 hektaroj). Post ega printempa sekeco ekkomencis je la 16-a de majo 1624 en la regiono de Lauscha (Laŭŝa) giganta arbarincendio. Pli ol 200 homoj devis fosi fosaĵojn por finfine stopi ĝin. Kvar tagojn daŭra incendio, kaŭzita de la malzorgemo de iu cindristo, estiĝis ĉe Steinach (Ŝtajnaĥ). La multaj malgravaj bruloj preskaŭ ne estas menciitaj.

Ankaŭ ŝtormoj ofte kaŭzis egajn arbarneniigadojn. En la jaro 1797 furiozis uragano en la regiono de Gehlberg (Gelberg) tiom terure, ke ankoraŭ post 30 jaroj oni raportis pri kolosaj amasoj da ŝtormefaligitaj kaj -disrompitaj arboj.

Meze de la 18-a jarcento komenciĝis la artefarita forstizo kaj kulturado de nuraj piceaj arbaroj sur vastaj terenoj, tiel kiel ni hodiaŭ trovas ilin.

Pro la geografiaj, klimataj kaj meteorologiaj kondiĉoj en la Arbaro Turingia ofte okazas faloj de malseka neĝo. Ili kaŭzas ĉefe en junaj kaj mezaĝaj arbareroj damaĝojn pro neĝodisrompado. Dum dudekjaraj tempospacoj oni registris en la centra parto de la Arbaro Turingia la jenajn damaĝojn, kaŭzitajn de neĝodisrompado: kvarfoje ĝis 1800, kvar de 1821-1840, ses de 1841-1860, dekunu de 1861-1880, ok de 1881-1900, tri de 1921-1940. En decembro 1952 kaj januaro 1855 malsekaj neĝadoj kaŭzis en la forstdepartemento Suhl (Sul) damaĝojn en kvanto de 428.000 kubometroj da neĝe-disrompitaj arboamasoj. Dum kiam la antaŭaj malsekaj neĝadoj estis nur loke limigitaj, okazis la ĝis nun plej grava damaĝo, trafanta la tutan Arbaron Turingian, en la nokto de la 30-a de novembro ĝis la 1-a de decembro 1981. Estis forte trafita ankaŭ la apudaj pli malalte situantaj antaŭregionoj. La neĝedisrompitaj arboj sumiĝis je ĉ. 5 milionoj da kubometroj. En novembro 1984 kaj januaro 1986 denove okazis parte konsiderindaj damaĝoj, kaŭzitaj de vehementaj ŝtormoj. Danko al la kolosaj penadoj flanke de la forstuloj, subtenata de ĝis nun senekzempla

engaĝiĝo de la tuta loĝantaro, oni sukcesis grandparte forlabori la ekde 1981 rompitaĵajn arboamasojn kaj eviti postsekvajn damaĝojn.

Ege elstaraj oni povas rigardi la laborsukcesojn de la forstistoj, forstlaboristoj kaj de granda parto el la loĝantaro, kiuj kune reforestizis dum relative mallonga tempo 15.000 hektarojn da senarbigejoj, kaŭzitaĵ de uragano je la 13-a/14-a de junio 1946. Precipe frapita estis la subdistrikto Suhl kun pli ol 10.000 hektaroj.

Ŝtormdamaĝoj okazis ankaŭ je la 11-a de majo kaj 1-a de aŭgusto 1958 en la forstarondismentoj Sonneberg (Soneberg) kaj Hildburghausen (Hildburghauzen). Preskaŭ unu miliono da kubometroj de faligitaj kaj disrompitaĵaj arboj kaj 1.600 hektaroj da senarbigejoj estis la viktimo de la ŝtormoj.

La disrompadoj fare de ŝtormoj kaj neĝadoj sekvigis pasintecce amasgeneradojn de bostrikoj. 1727 oni raportis la unuan fojon pri “nekonata epidemio” el Rudolstadt (Rudolŝtad) kaj Neuhaus (Nojhaŭz). Oni diris: “La forsto de Scheibe (Ŝajbe) suferis la plej multan. Migrante tri horojn laŭ longo kaj duonhoron laŭ larĝo oni povas rigardi nur formortitaĵajn arbojn, plorinde vidi”. Grava infestado de bostrikoj oni registris en 1736/37, 1781/85, 1795/98, 1822, 1857/59. La supermezuraj arbfaligadoj dum la Dua Mondmilito kaŭzis 1944 denove amasgeneradon de bostrikoj. La damaĝoj fare de la uragano en 1946 subtenis pluan disvastiĝon. Sekve de tio ĝis 1948 pli ol du milionoj da kubometroj de arboj estis infestitaĵ en la centra parto de la Arbaro Turingia.

Al la timitaĵaj arbarparazitoj de monokulturoj ankaŭ apartenas la “monaĥino” (*Lymantria monacha* L.). El ĉiuj montaroj de mezeŭropo pululadoj de *Lymantria* kaj de ĝi faritaĵaj damaĝoj de ega amplekso estas konataĵ. En la Arbaro Turingia oni ne povis observi tiaĵn damaĝojn, kvankam la monaĥino ankaŭ tie malbonagis. La lastan pululadon de la monaĥino oni datumas en la forstarondismento Suhl.

Nuntempe la arbaroj de nia turingia mezmontaro estas minacataĵ de nova insida danĝero. Eble ĝi estas la plej grava en la ĝisnuna historio de la Arbaro Turingia. Kiel multloke sur la norda hemisfero de nia globo, ankaŭ la Arbaro Turingia estas trafita de la tielnomataĵ “novspecaĵ arbardamaĝoj” (ĝenerale arbarmortiĝo). Jam estas videblaj en la krestoregionoj gravaj damaĝoj, kaŭzitaĵ de acidaj pluvoj kaj sekundaraj aer-poluciaĵoj, antaŭ ĉio ozono kaj peroksiacetilnitrattoj (PAN). Per Ca- kaj Mg-sterkadoj oni povas kompensi la forlavadon de kalcio kaj magnezio el la asimilad-aparato kaj grundo. Sed tio povas esti nur provizora solvo, nur stagniganta la malsanon. Por atingi daŭran solvon oni devus draste redukti la enaerigon de nocaj substancoj. Sed tio fareblas nur per objektiva internacia kunlaborado (kiel premiso) kaj ellaborado kaj realigo de internacia agadprogramo de publika utilo. Ĉar estas por ni hodiaŭ la demando, ĉu ni sukcesos bridi la moleĥon “progreso” aŭ ĉu ĝi nin formanĝos.

La registaro de GDR elspezas en ĝis nun ne konata kvanto en la historio de la Arbaro Turingia materiaĵn kaj financaĵn rimedojn por la konservado de la daŭra fruktuzo kaj plialtigo de la stabileco de siaĵ arbaroj, sciante pri la multaj funkcioj de la arbaroj kaj pri tio: Kie la arbaroj verdas – tie ankaŭ la lando prosperas, sed kie la arbaroj mortas – tie ankaŭ la lando mortas.

(januaro 1987)

fake kaj lingve reviziis: Ingward Ullrich